Sceno 9

Mazi: *(al Pseŭdo-Silvja)* Staru ĉi tie. Hmm. Mi montros ion.

La Silvjaj-kopioj enkomputiliĝas.

Karlo: Ili reiras! Rigardu! Ili malaperas!

Kanto "La kopioj de Silvja"

Silvja: Kopioj tiuj.
Karlo: Estis eble mil.
Silvja: Nun reiras ĉiuj
Karlo: Al la komputil'.
Reĝo: Ĝojas Gondolanda reĝo...
Reĝino: **...**kaj reĝin'. Vivu Mazi Granda!
Ambaŭ: Ni admiras vin!
Silvja: Jen kopioj miaj
Karlo: Iras al maŝin'.
Silvja: Unu post alia.
Ambaŭ: Sep, ses, kvin!
Karlo: Ili multaj estis,
Silvja: Jen la lastaj tri!
Karlo: Fine unusola restis.
Kiu?
Ĉiuj: Klare!
Silvja: Mi!
Ĉiuj: Hura! Hura! Hura!

Sceno 10

Kanto: Amkanto

Silvja, Karlo: Nia historio
al feliĉa fin'
venas nun pro tio,
ke mi amas vin!

Petro: Kiu estas tiu knabino?
Kio ŝi estas?
Kie ŝi vivas?
Kiam ni revidos ŝin?
Kial mi estas ĉi tie?

Sceno 11

Geedziĝa sceno

Silvja, Karlo: Ĝis la vivofin'
mi amos vin!

Sceno 12

Korvaks laboras.

Mazi: Tio iras tien, ĉi tio - ĉi tien.

Korvaks: Kompatinda mi!

Mazi: Tiun.

Korvaks: Tiun ĉi?

Mazi: Ne, la grandan.

Korvaks: Ho, ve! Ho, ve! Ho, ve! Ho, ve!

Mazi: Nun prenu tiun.

Korvaks: Tiun ĉi?

Mazi: Kaj tiun alian!

Korvaks: Terura laboro!

Mazi: Mi tagmanĝas nun!

Korvaks: Ankaŭ mi malsatas.

Mazi: Enpaku ĉiujn ĉi!

Korvaks: Ho, ve! Ho, ve! Ho, ve!
Ho, ve!





Sceno 13

Kanto: “La adiaŭa”

Mazi: Ĉio pasis bone, do mi iras for!

Reĝo: Dankon, Granda Mazi! Ploras mia kor’!

Ĉiuj: Ĝis revido! Ĝis! Adiaŭ, kara Mazi!
Nun adiaŭas vin - Reĝo, Reĝino, Silvja, Karlo!
Korvaks, Petro!
Adiaŭ! Adiaŭ! Adiaŭ! Adiaŭ!
Adiaŭ! Adiaŭ! Adiaŭ! Adiaŭ!
...